

juna amiko 茶

februaro 2018 • n-ro 1/2018 (154)

Teo kaj

获奖

Filmopre

PROGRESIGA REVUO
POR LEGEMULOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

Filmfestivalo
“Teo kaj Amo”
Lerneja maskobalo
La paska ovo mem farita
Marie Curie ĉiam la unua

Kolibrido



Ni estas bakterioj kaj virusoj. Ni estas ĉi tie por malsanigi vin.



Sed tiu ĉi estis preparita por fari bonon.



Bone, vi ne ploris.



Kompreneble, pli malbone esti malsana ol ricevi vakcinon.



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK);
Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 5



Konversaciaj temoj: Lerneja maskobalo (Judit Felszeghy, HU) 6



Nature: Vespertoj (Jose de J. Campos Pacheco, CU) 11

Inventoj: Marie Curie ĉiam la unua (Renée Triolle, FR) 12



LUDE, la unika dua etaĝo: Timisian propran ombron (Mónika Molnár, CH) 14

Japanaj enigmoj (Hori Jasuo, JP) 16



Logika ludo: Tangramo (José Roberto Ruiz) 17



Legu kaj ĝuu: Ni legu...! Klubo de bona libro. Ekkonu mian landon pere

de ĝia legendo: D.R. Kongo (Małgosia Komarnicka, PL) 18

Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) 24



Malstreĉiĝu kun Juna Amiko: La paska ovo mem farita... (Małgosia Komarnicka kaj Grażyna Bosek, PL) 25



Interkultura Mondo: Projekto Filmfestivalo "Teo kaj Amo" (Elena Nadikova, RU) 26



Nomoj kaj arboj: Salikoj abundas sur nia planedo kaj en nia movado (Mireille Grosjean, CH) 32



Ideo: Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 34

Komiksoj / bildrakontoj: Mir – la pluŝanasido (Liette Lela kaj Luiza Carol, IL) . 35



Recenzo: Ludoj taŭgaj por ĉiuj esperantistoj (Luiza Carol, IL) 37



LASTE: Krucenigmo. (Stano Marček, SK) 38


Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Reĵeto:** sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Mayer (DE), Rob Moerbeek (NL). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en majo 2018. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

La jarfinaj kaj novjaraj festoj jam finiĝis – kaj jen venis la sezono de lernejoj maskobaloj (en KONVERSACIAJ TEMOJ vi lernos kiel elekti aŭ mem fari taŭgajn maskojn) – kaj jen proksimiĝas la paskaj festoj! Vi povas surprizi viajn proksimulojn per memfaritaj paskaj ovoĵoj! (Vidu la rubrikon MALSTREĈIĜU KUN JUNA

AMIKO). En la numero vi trovos ankaŭ interesan artikolon pri la inventoj de la pola-franca duobla nobelpremiito Marie Curie, admiros noktajn vespertojn en la rubriko NATURE, saĝiĝos kaj lertiĝos dank' al la ĉina logika ludo Tangramo – kaj riĉiĝos (!!!) helpe de la japana enigmo... – Vi povas lerni de krokodilo, kion oni devas fari por reakiri la



perditajn dentojn en la rubriko LUME. En la rubriko LEGU KAJ ĜUU vi konatiĝos kun tre interesa lando D.R. Kongo, kun

fabeloj el ĝia naturo kaj kun bela libro – Esperanta komikso el Pollando. Sed vi povas ankaŭ kunkanti belan francan kanton – kaj kun amo trinki teon dum spektado de belaj filmoj el la filmfestivalo “Teo kaj Amo” en Ĉinio.

Eble vi ne scias, ke salikoj ne estas nur arboj, sed ankaŭ famaj esperantistoj, – kaj ke

dank' al stultaj ideoj vi povas malkovri aliajn kulturojn.

– Kaj ĉu vi ŝatas komiksojn aŭ bildrakontojn? – Vi trovos kelkajn en tiu ĉi numero. Ankaŭ instruajn kaj amuzajn ludojn, taŭgajn por ĉiuj esperantistoj (krucenigmojn), en la recenzo – kaj en la rubriko LASTE. – Agrablan legadon!

Via redaktoro **Stano Marček**

Karaj legantoj!

Denove la legado de nia revuo vojaĝigos nin tra diversaj landoj. Per malkovro de ne bone konata, foje timata besto, la vesperto, ni scios, kiom utila ĝi estas, ĉar ĝi manĝas insektojn. Kiam mi vivas en Kotonuo, en Benino, en kulturcentro JoCa (vidu la fotojn), mi foje vidas unu aŭ du vespertojn vespere, kiam la birdoj dormas. Tiam flugantaj bestoj certe estas vespertoj. Ili flugas tra la koridoroj, ĉar la muroj havas truojn, tio helpas al cirkulado de aero. Iom post iom oni sukcesas rekoni ilin,



ĉar ilia flugo estas iom skua, ne glita kiel birdoj glitas.

Ni ankaŭ ion ekscios pri DR Kongo, granda afrika lando. Ni ankaŭ saltos al Ĉinio kaj malkovros italan kutimon kaj japanan kredon.

Kiel kutime enigmoj kaj ludoj ne mankas.

Fine mi deziras emfazi la saĝecon de Marie Curie: “Ni ne atentu, kio estis farita, sed vidu nur la farenaĵojn”, – ŝi

kutimis diri. Zamenhof esprimis la saman saĝecon: “Kuraĝe antaŭen!”

Mi deziras al vi agrablan legadon!



Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, beston kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, besto kaj vestoj? Kio okazas sur la bildoj? Ĉu ili estas egalaj?



Kolorigu! Trovu la 15 diferencojn!

februaro 2018 / 5 ←



Lerneja maskobalo

Help-materialo por progresemluloj.

Rubrikestro: Judit Felszegy.

I. Kiu fariĝu kio?

La instruistino (I) babilas kun la unuaklasaj gelernantoj: Manjo (M), Karlo (K), Lea (L), Kolomano (k), Roberto (R) kaj Flora (F), en la lerneja klasĉambro.

I – Karaj infanoj! Vi estas jam lernejanoj, kaj vi povas partopreni la grandan, ĉiujaran maskobalon de nia lernejo! Necesas pripensi kaj elekti, al kio, aŭ, al kiu vi deziras simili, kiun maskon vi surhavas en la maskobalo.

M – Mi ŝatas maizon! Mi volas fariĝi maizo!

I – Kiel aspektas maizo?

M – Maizo estas flava... ĝi havas verdajn foliojn.

K – Krome Manjo havas flavajn harojn, kaj ŝi eĉ similas al maizo!

I – Bone, Manjo, vi fariĝu maizo! Vi estos

Maizo-Manjo. (Al la aliaj:) Sed ŝi havas

ne flavajn sed blondajn harojn.

M – Mia fratineto ankoraŭ ne estas

lernejanino, ŝi vizitas infan-





ĝardenon. Ĉu ankaŭ ŝi povus partopreni la maskobalon? Ŝi tre ŝatas frambon!

I – Ĉu vere? Do, bone, ankaŭ ŝi partoprenu! Via fratineto povas esti Frambo-Franjo.

I – Kaj vi, Lea, kio vi deziras esti? Vi havas nigrajn harojn, nigrajn okulojn kaj belan malhelan haŭton.



L – Mi deziras esti princino... – aŭ eble reĝino!

I – Bone, Lea, se vi ŝatas, vi fariĝu princino, vi estu Luno-Lea, la princino de la nokto!

K – Dume, mi estas ŝia kavaliro, ĉar mi havas glavon!

I – Karlo, vi estu la Kavaliro, ankaŭ ĉar vi estas brava kaj kuraĝa! Ĉu vi ne deziras inviti ankaŭ vian frateton?

K – Jes, jes! Henriko ĉiam rampas, sub la tablon, sub la liton, sub la seĝojn, kiel heliko.

I – Ĉu via frateto deziras fariĝi Heliko-Henĉjo?

K – Al Henriko certe tre plaĉos esti Heliko-Henĉjo!

I – Kaj vi, Kolomano? Ĉu vi jam divenis, kiun maskon vi havu?

k – Mi pensas... – ke mi estu koko! En nia hejmo ni havas kokojn, kaj ili tre plaĉas al mi! Mi estos Koko-Kolĉjo! Mi havos buntajn vosto-plumojn kaj ruĝan kreston.

M – Roberto estu roboto!

R – Ĉu? Mi? Kial?

M – Ĉar vi ĉiam rakontas pri sciencfikciaj filmoj, kaj pri robotoj! Tial mi pensas, ke vi ŝatas tiaĵojn.


R – Vere! Do, mi estos Roboto-Robĉjo! Ha ha, mi iom malfacile povas elparoli mian nomon!

k – Kio fariĝu Flora? Ŝi nur silentas, kaj ridetas.

I – Flora, kiel vi aspektas? Al kio vi similas?

F – Mi havas blondajn harojn, blujajn okulojn, mi estas ne alta kaj ne dika. Mi ne scias, al kio mi similas.

k – Flora similas al floro! Sed kiun nomon ni elektu por ŝi?



II. Kiu kion faras?

Petro, la kamentubisto (P), Neĝhomo-Nadja (N), Miĥaela, Muso-Miha (M), Papilio-Paŭla (p), Arnoldo la Atleto (A), Kato-Katarina (K) kaj Elfo-Emilo (E) babilas dum la lerneja Masko-Balo.

P – Saluton, kio vi estas?

N – Saluton Peĉjo! Mi estas Nadja. Ĉu vi ne rekonas min?

P – Mi ne demandis KIU, sed KIO vi estas. Mi certe rekonas vin!



N – Mi estas Neĝohomo. Mi surhavas blankan mantelegon, buntan ŝalon, blankajn botojn kaj blankajn gantojn.

P – Tre bone! Vi surhavas ankaŭ poton sur via kapo, kaj balailon. Mi tamen fariĝis kamenpurigisto!

N – Ankaŭ vi aspektas tre bone, Peĉjo! Viaj cilindra ĉapelo kaj kamenpurigilo tre plaĉas al mi! Ĉu via ŝtupareto ne estas tro peza?

P – Tute ne! Ĝi ja estas el kartono!

N – Rigardu! Tie jam dancas Paŭla kun kokcinelo, ni iru al ili!

P – Paŭla estas la papilio kun flavaj flugiloj. Sed kiu estas la kokcinelo, mi ne rekonas lin, dancanta dorse al ni. Bone, ni alproksimiĝu al ili!

M – Venu! Venuuu! Rigardu Arnoldon, kion li faras! Kiel lerta atleto li estas!

p – Kion faras Arnoldo?

M – Arnoldo estas Atleto, kaj nun li staras sur sia mano!
Eĉ, sur nur unu mano!

A – Rigardu min! Nun jam mi sukcesis!

M – Ho ve! Ankaŭ kato venas, kaj volas kapti min, la povran museton! Kiu estas la kato?

K – Ni timu Miĥaela, mi estas amikema kato! Mi estas Katarina kaj mi ne ŝatas manĝi musojn, sed ĉokoladon!

E – Vi estas bela kato, kun longa vosto kaj pintaj oreloj! Sed ĉu vi povas bleki, kiel kato?

K – Mi certe povas miaŭi: miaŭ, miaŭ, miaaaŭŭŭ!

E – Sufiĉas, sufiĉas! Ni jam preskaŭ surdiĝas!

p – Ankaŭ vi dancu kun ni! Kion vi portadas en via mano, Emilo?

E – Ĝi estas... hm...

P – Pioĉo.

E – Kio? Ha, jes! Ĝi estas pioĉo!





Ĉar mi estas elfo, Elfo-Emilo kaj pioĉas en la arbaro, en la grotoj. Mi serĉadas oron. Kaj la oron mi poste donos al Neĝulino, ĉar ŝi estas tre bela, kun krono sur sia nigra hararo, en blanka robo. Mi petas vin, bela Neĝulino, dancu kun mi!


Taskoj

I.

- Legu la tekstojn, unue sola, poste, se eblas, kun partneroj!
- Rigardu la bildojn, kaj vicigu, kiuj roluloj partoprenos, kaj partoprenas la maskobalon!
- Rigardante la bildojn, rakontu, kiel aspektas Maizo-Manĝo, Luno-Lea, Koko-Kolĉjo, Flora, Neĝhomo-Nadja, Peĉjo, la kamenpurigisto, Papilio-Paŭla (uzante la verbojn “havas”, “surhavas”)!
- Rigardante la bildojn, rakontu kiel aspektas la sekvaj, menciu ankaŭ, kion ili surhavas: Frambo-Franĵo, Kavaliro-Karlo, Heliko-Henĉjo, Roboto-Robĉjo, Kato-Katarina, Kokcinelo, Muso-Miha, Atleto-Arnoldo, Elfo-Emilo kaj Neĝulino (uzante la verbojn “havas, surhavas”)!

II.

- Starigu demandojn kun viaj partneroj pri la bildoj, uzante: “Kiel aspektas ...?” kaj “Al kio / kiu similas ...?”, kaj respondu la demandojn. (Ekzemple: Kiel aspektas Neĝulino-Nadja? – “Ŝi aspektas kiel neĝhomo...”, Al kio similas Neĝulino-Nadja? – “Nadja similas al neĝhomo, ĉar... ”)
- Parolu pri ĉiuj figuroj de ambaŭ desegnaĵoj, forgesu pri neniu!
- Kun partnero interkonsentu, kiun maskon vi elektus el la desegnaĵoj, kaj kial?!





• Kun viaj partneroj kolektu kiel eble plej multajn besto-voĉojn, kaj interkonsentu, al kiu besto kiu blekado apartenas! Ne estu tamen tro laŭtaj!

• Imagu, ke vi devas mem prepari iun el la masko-vestaĵoj, por vi mem, aŭ por via infano! Priparolu kun via(j) partnero(j) kiun vi elektus, kaj kiamaniere prepari ĝin, ilin (uzu verbojn: pripensi, pruntepreni, desegni, kopii, tondi, kudri, glui, surglui, farbi, kolorigi, surmeti)!

III.

• Imagu, ke ankaŭ vi (aŭ via infano) deziras partopreni la maskobalon! Kian masko-vestaĵon vi surhavis? Prezentu la masko-vestaĵon detale!

• Preparu la tekston de anonco aŭ/kaj afiŝo por la lerneja maskobalo! Ne forgesu pri la loko, tempo ktp!

• Preparu mallongajn (2-4-frazajn de ambaŭ) dialogojn, inter Luna-Lea kaj Kavaliro-Karlo, Koko-Kolĉjo kaj Floreto, Elfo-Emilo kaj Neĝulino laŭeble surbaze de la desegnaĵoj aŭ la dialogoj!

• Imagu, ke ankaŭ vi (aŭ via infano) partoprenis la lernejan maskobalon, kaj rakontu pri ĝi al via amik(in)o, persone, telefone, aŭ se letere, en 15 – 17 linioj!

• Verku mallongan retan artikolon (blogon) pri via okazinta aŭ imagita masko-balo! Kiuj partoprenis, kiel ili estis maskitaj, ĉu la masko-vestaĵoj plaĉis al vi (spritaj, fantaziaj, multekostaj, elegantaj...), kaj kial? Aldonu vian opinion, ĉu la maskobaloj estas bonaj amuziĝoj, kaj kial?!

Vortklarigoj

Maizo: Unujara herbo, 2 - 4 metrojn alta, kun malmolaj, flavaj grajnoj, el kiu oni faras farunon, kuiras kaĉon.

Frambo: Malgranda, rondeva, malhelruĝa frukto, kreskanta sur arbusto, kun dolĉa, acideca gusto kaj agrabla aromo, el ĝi oni ofte preparas sukojn kaj konfitaĵon.

Franjo: Karesnomo de "fratino" kun aldono de -*njo* finaĵo. **Bunta:** Multkolora.

Kresto: Ofte ruĝa, haŭta elkreskaĵo sur la kapo de kelkaj birdoj, ekzemple de koko kaj meleagro. **Sciencfikcia:** Filmo aŭ literatura verko, kie scienco (ofte tekniko) miksiĝas kun fantazie elpensita neveraĵo.

Neĝhomo: Homforma pupo, farita el neĝo.

Kamenpurigilo: Ilo el broso kaj fleksebla drato por purigi kamenon. **Kartono:** Iom pli malmola kaj dika papero. **Kokcino:** Malgranda skarabo, ofte kun ruĝaj flugiloj kaj sur ili po sep cirkloformaj makuletoj.

Papilio: Insekto kun relative grandaj kaj multkoloraj, belaj flugiloj. **Muso:**

Malgranda, griza rongulo, vivanta ankaŭ proksime al homaj loĝejoj. **Surda:** Tiu, kiu ne aŭdas. **Bleki:** Eligi bestan voĉon.

Atleto: Homo, amatore aŭ profesie praktikanta sportojn, kiuj postulas grandan forton kaj lertecon. **Povra:** Inda je kompato. **Pioĉo:** Fera ilo kun ligna tenilo, per kiu eblas disrompi malmolajn rokon, terpecon. **Elfo:** Fantazia, homforma estaĵo. **Neĝulino:** Reĝa filino, el fabelo de la fratoj Grimm, kiun forpelis kaj poste volis mortigi ŝia duonpatrino.





Jose de Jesus Campos Pacheco

Vespertoj

Vespertoj aŭ kiropteroj vere estas flugantaj mamuloj, ne birdoj. Ili estas varmsangaj, kaj la haŭto estas harkovrita. La “flugiloj” vere estas manoj, kun tre longaj haŭtkovritaj fingroj.



Ili kapablas flugi en mallumo pro sia mirinda aŭdsento. Fluganta vesperto eligas ultrasonajn voĉojn, kiuj ĉe frapado kontraŭ objekto revenas kiel eĥo. Ĉi tion la vesperto aŭdas sufiĉe frue por ebligi al si eviti kolizion. Vespertoj estas troveblaj tra la tuta mondo, kaj iuj el ili migradas.

Unu el la plej abundaj estas la malgranda **Pipistrello**. Dum flugado ĝi movas sin rapide kaj tordturniĝe, kaj ĝi ofte dormas en grenejoj, preĝejoj kaj malnovaj domoj. **Longorela Vesperto** estas facile rekonebla



pro la longaj oreloj. Ofte ĝi vintrodormas en kavernoj, kie oni povas ĝin preni en la manon kaj konstati, ke ĝi estas rigida kaj malvarma.

Noktolo estas trovebla en grandaj urboj kaj estas videbla dum flugado en la parkoj kaj placoj.

Tiuj tri specioj de vespertoj estas malgrandaj kompare kun la gigantaj



vespertoj de tropikaj landoj, nomitaj **Fruktaj Vespertoj**, kiuj havas flugilarĝecon de unu metro. En Aŭstralio vivas vesperto **Fluganta Vulpo** – la plej granda vesperto sur nia planedo, kun 2-metra longeco de la etenditaj flugiloj.





Renée Triolle

Marie Curie ĉiam la unua

Ĉar Pollando kaj Francio batalis por scii, al kiu lando apartenas tiu elstara virino, Marie Curie-Skłodowska ne eniris la liston de la famuloj, kiujn Unesko festis en 2017.


Tamen ŝi plene meritis, ke la tuta mondo festu ŝin: bela, laborema, ŝi sukcesis vivi paralelajn vivojn de esploristino, amantino, patrino, kaj pro siaj nerefuteblaj kapabloj trudis sin en viran mondon.

1867: Antaŭ 150 jaroj, la 7-an de novembro 1867, en la pola parto de la rusa imperio, naskiĝis en intelekta familio de patriotaj instruistoj la kvina infano, Maria Skłodowska. Ŝi brile studis kaj kun sia pli aĝa fratino morale kontraktis, ke la fratino laboros por pagi la studojn de Maria en Parizo, kiu reciprokos tion al ŝi, kiam ŝi eklaboros.

1893: Alveninte al Parizo en novembro 1891, por studi en la fama universitato Sorbonne (*Sorbon'*), Marie sukcesis atingi



La kvin infanoj de la familio Skłodowska: Sophia, Bronislawa, Maria, Joseph kaj Helena (1872).




en la unua loko licencon (D3) pri fiziko kaj en la dua pri matematiko en 1894.


1896: Ŝi edziniĝis al la franca fizikisto, jam konata pro esploroj pri elektro kaj magnetismo, Pierre Curie (*Pjer'Kuri'*) kaj la postan jaron sukcesis akiri agregacion (D5) pri fiziko. Ŝi ek esploris la "uraniajn radiojn", kiujn malkovris Henri Becquerel (*Anri' Bekrel'*).

1903: Ŝi defendis disertacion pri raraj radioaktivaj substancoj kaj iĝis la unua ina doktoro pri fiziko. Kun sia edzo kaj Henri Becquerel ŝi ricevis nobelpremion pri fiziko, pro malkovro de la natura radioaktiveco.

1906: Post la akcidenta morto de ŝia edzo (li falis sub ĉevalveturilon) la Fakultato pri Sciencoj konfidis al ŝi la katedron kaj tiel ŝi iĝis la unua virino, kiu instruis en Sorbonne. Ŝi iĝis la unua ina konstanta profesoro en 1908.

1911: La 10-an de decembro ŝi ricevis la nobelpremion pri kemio pro esploroj pri polonio (Po), kiun ŝi malkovris kaj nomis laŭ sia lando Pollando, kaj radiumo (tre malpeza metalo, kiu mem radias kaj poste uziĝis por radiografado). Ŝi ne nur estas la nura virino, kiu ricevis du nobelpremiojn





sed la sola homo, kiu ricevis tiun premion en du malsimilaj sciencoj.

1915: La Unua mondmilito etendiĝis en Eŭropo, multaj soldatoj mortis, sed ankaŭ multaj estis vunditaj. Ŝi uzis siajn esplorojn pri radiografio por savi multajn soldatojn, kreante la tiel nomatajn Etajn Kuriojn (*les petites Curie*), veturilojn kun radiaparato, kiuj sur la batalkampoj permesis al la kuracistoj vidi en la korpo de vunditoj, kie estas metalpeco, operacii pli precize kaj ne tuj amputi. Helpis ŝin ŝia pli aĝa filino, Irène (*Iren'*), ankaŭ fizikistino.

1920: Kun subteno de Claudius Regaud (*Klaŭdius Rego'*) kaj mono de Henri de Rothschild (*Anri' de Rotŝild'*) ŝi kreis fondaĵon por financi la esplorojn de Instituto pri Radiumo, malfermitan en 1909, kaj kontribui al la disvolviĝo de ĝia kuraca flanko. Tiu fondaĵo iĝis modelo por estontaj kontraŭkanceraj centroj tra la tuta mondo .

1934: Manipuladante radiaktivajn substancojn sen aparta protekto, Marie estis trafita de sangomalsano, leŭkemio, kaj mortis la 4-an de julio. Ŝi postlasis la filinon Irène Joliot-Curie (*Iren ŝoljo-*


Kuri'). Mem altranga fizikisto, tiu kun sia edzo malkovris en 1932 la neŭtronon, kaj en 1934 artefaritan radioaktivecon. Ŝi mem ricevis nobelpremion pri kemio en 1935. Do supozeble Maria estas la unua nobelpremiito, kiu naskis nobelpremiiton!
1995: la 20-an de aprilo ŝi eniris kun sia edzo la Panteonon, monumenton al la elstaraj francoj kaj iĝis la unua virino en tiu rimarkinda loko.

Kio restis post ŝi? La nepino Hélène Langevin (Elen' Lanĵeven'), mem fizikistino, kiu asertas, ke “se Marie ne estis la unua virino-sciencistino, ŝi restas la plej konata simbolo”. En Francio estas Instituto Marie Curie, kie oni esploras por kompreni kiel ekestas kanceraj kaj kiel poste agi. Sed ĉefe ŝia spirito “Ni ne atentu, kio estis farita, sed vidu nur la farendaĵojn”, – ŝi kutimis diri. Ŝi kapablis ligi siajn eltrovaĵojn kun tujaj praktikaj celoj, kio malofte ĉe esploristoj, kaj kapablis kolekti monon por sia laboro. Ne forgesu, ke jam dum sia vivo en Usono ŝi ricevis de la prezidento Herbert Clark Hoover unu gramon de radiumo por pluaj esploroj, pagitan de rikoltitaj 100 000 dolaroj, ĉar ŝi fidis, ke la scienco estas bazo de ĉiuj progresoj, kiuj malpezigas la homan vivon kaj malgrandigas suferadon”.

Diru al ni, ĉu en via lando scienca esplorado estas ĉefe helpata de bonvolemaj donacemuloj, aŭ de la ŝtato; ĉu ekzistas lernejoj kun la nomo Marie Curie; ĉu vi konsentas kun ŝia difino de la scienco?
triolle.renee@wanadoo.fr



Timi sian propran ombron



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

Ĝojulido kaj Kuiremulido longe pensadis pri la rigardota filmo. Ili ne tuj sukcesis elekti iun specifan filmon.



– Ĉu vi havas iun deziron, Kuiremulido? – demandis ĝentile Ĝojulido. – Ja estis vi, kiu savis la vesperon kaj niajn stomakojn per la

bongusta vespermanĝo, do estu vi, kiu elektos la filmon.

– Hm, mi ne scias. Nun, kiam Ulideto dormas, eble ni povas vidi iun timigan filmon, sed mi ne vere scias kiun... Ĉu vi havas sugestojn?

– Ni havas multajn filmojn, sed kelkaj estas nur por la gepatroj, tiujn mi ne vere volas tuŝi, ĉar mi bezonas nek kverelon, nek malpermesojn. Ĉu bone?

– Jes, jes, tute bone. Ho, rigardu, mi trovis filmon, kiun jam delonge mi ne vidis: “Mazi”! Ĉu vi memoras? Estas la granda, verda monstro, kiu mangâs...

– Jes, jes, mi bone memoras. Kaj ni eĉ havas ĝian specialan version kun la desegno de Numa Schmucki [’numa ŝmuki’], sed... mi ĵus spektis ĝin semajnfine kun miaj gefratoj... Tamen, subite venis al mi ideo! Vidu tiun ĉi: “La krokodilo sen dentoj”



de Eloïse Marotte [’eloiz marott’]. Tiu ĉi ŝajnas esti tute nova filmo. Kion vi pensas pri ĝi?

– Mi tute ne konas ĝin kaj mi tre ŝatus scii, kio okazas en ĝi. Miaflanke ĝi ŝajnas esti bona elekto. Ĉu vi havas puf-maizojn?

– Cert! Ho, kiom bela vesperfino estos tiu ĉi! Mi esperas, ke vi estas pli kuraĝa ol Timemulido, ĉar kun li mi tute ne volus rigardi timigajn filmojn!

– Kial? Ĉu la filmo estas tiom timiga? Fakte, kie estas viaj hundoj? Mi tute ne vidis ilin dum la tuta vespero...

– Ĉu vi timas? Aĥĥĥ, la filmo estos terure timiga! Ĉu vi certas, ke vi volos vidi ĝin?




– Jes... mi pensas... sed mi estus pli trankvila, se mi scius, kie estas la hundoj...

– Ho, ne estu tiom malkuraĝa! La filmo ne estas terura, Timemulido timas eĉ sian propran ombron kaj la hundoj baldaŭ revenos hejmen kune kun la gevoj. Ĉu nun vi fartas pli bone?

– Jes, efektive. Ne estis tre ĝentile tiom timigi min!

– grumblis Kuiremulido.

– Tamen, se vi havas bongustajn puf-maizojn, mi pensas, ke mi tuj pardonos vin. Ha-ha-ha! Nu, ni rigardu tiun filmon, nun mi jam vere scivolemas pri ĝi!



**Eloïse Marotte:
La krokodilo
sen dentoj**

Estis foje krokodilo, kiu ne ĉesis plori. Ĝi havis grandajn, krokodilajn larmojn pro la fakto, ke... – Snif-snif, mi ne havas dentojn! Mi volas havi belajn, blankajn dentojn!

– Mi ne havas dentojn, sed mi havas ideon! Mi iros en la arbaron, en la domon de la sorĉistino. Eble ŝi havos iun magian trink-miksaĵon por ke mi havu solvon al la problemo.



La domo de la sorĉistino estas terura! Ŝi havas multegajn araneojn, strangajn bestojn kaj magiajn trink-miksaĵojn.
– Mi esperas, ke ŝi havos ion ankaŭ por mi!

“Frap-frap...” – Saluton, sorĉistino! Mi havas demandon: ĉu vi havas magian trinkmiksaĵon por ke mi povu havi dentojn? – Ne, sed mi povus fari ĝin. Por tio mi bezonas specialan floron. Ĉu vi venos kun mi serĉi ĝin?
– Jes, volonte!

Venu, estas ĉi tie tiuj blujaj floroj, kiujn ni bezonas. Tenu la sakon por la floroj. Dankon!
– Ho, kiom belaj estas ankaŭ la floroj, ankaŭ la montoj! Kiel ili nomiĝas?
– Mi ne scias, mi konas nur la florojn, nur ili estas utilaj.





- Ankoraŭ momenteton, kaj... jen, mi finis ĝin!
 - Pfuu! Ĝi vere tre malbonodoras!
 - Jes, mi scias, tamen vi devos trinki ĝin!
 - Glut-glut... Jes! Ĝi funkcias! Mi havas dentojn!!!



- Ĝis la revido, sorĉistino, kaj koran dankon por miaj belaj, blankaj dentoj! Mi estas tiom feliĉa! Dankon! Dankon!
 - Nedankinde, sed ne forgesu ĉiam bone lavi ilin por ke ili restu belaj!

- Do, ĉu la filmo estis tro timiga por vi aŭ ne?
 - demandis Ĝojulido.
 - Ne, tute ne! Mi tre ŝatis ĝin! De la komenco ĝis la fino! - diris ridetante Kuiremulido.
 - Eĉ tio ne ĝenis min, ke la geavoj kaj la hundoj ne estas hejme. Atendante ilin, ni povus jam vestiĝi en pijamon kaj fari kiel la krokodilo.
 - Kiel la krokodilo? Ĉu vi volas plori???
 - Ha-ha, tute ne, sed jes ja, lavi la dentojn! Mi esperas, ke ne estas araneoj en la banĉambro...
 - Aaaaaaaaaaaaaaaaaa!

Japanaj enigmoj

Kion faras tiu viro? Li tenas korbbon kaj en ĝi estas moneroj. Ĉu li lavas malpurajn monerojn?



Tiu ĉi estas angulo de iu ŝintoisma templo. El la rokaro fontas sankta akvo. Se vi lavas monerojn per tiu akvo, ili multobligos, nome vi fariĝos riĉa. Tiun benon donas al vi la bela diino Benzai.

Hori Jasuo







Tangramo

La kvadrato, el kiu la Tangramo aperas, servas ankaŭ kiel bazo por kelkaj ludoj kiel ŝako kaj damludo.



Oni ne scias, kiam precize la Tangramo aperis en Ĉinio unuafoje. Tamen, ĝia nomo ĉine – *Tch'i Tch'ia pan* – datiĝas de la 7-a jarcento a.K., kaj




signifas “Tabulo de la Sep Saĝecoj”, ankaŭ konata kiel “Tabulo de la Sep Subtilecoj”.

La Tangramo estas ludo, elpensita jam antaŭ multaj jarcentoj kaj uzata de infanĝardenoj ĝis majstroj klasoj pro sia variebleco, por elvolviĝado de lertecoj kaj por esploro de sciaro, ĉar per ĝi povas aŭ reprezenti preskaŭ ĉiujn ĉirkaŭajn objektojn.

Pluraj lertecoj povas elvolviĝi per Tangramo, ekde la fleksebleco, estimo, spacimago, klasifikado, inversigeblo, ĝenerala memoro, ĝis tiuj rilataj al erardigesto, la



rezisto al frustrigo kaj persisto. Tiuj lertecoj, kiuj evidentiĝas lude, estas necesaj ankaŭ por komputillernado, por elvolviĝo de projektoj kaj por uzado de teknologio.



La Tangramo formiĝas per sep pecoj, inter kies randoj estiĝas ĝustaj proporcioj, kiel montras la figuro. Oni povas fari ĝin per papero aŭ ia ajn materialo, en ia ajn koloro.

Por la figurformiĝo nepre uzu ĉiujn sep pecojn. Se abstraktaĵo, eblas lasi interspacojn.

José Roberto Ruiz

Vidu ankaŭ: <https://lernu.net/eo/forumo/temo/7414> kaj <https://eo.wikipedia.org/wiki/Tangramo>

Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com




Ni legu... !

Dum la lastaj monatoj mi pli ofte veturas per buso. Mi do multe da tempo pasigas atendante la buson. Dank' al tio mi povas interparoli kun multaj homoj.

Dum tiuj interparoloj mi ofte demandas pri legado. Interesas min, ĉu fakte homoj ne legas, kaj do ĉu statistikoj ne mensogas. Bedaŭrinde, la statistikoj ne mensogas. Tre malmulte da homoj legas librojn, iuj el ili legas nur gazetojn (kun ĉiutagaj informoj)... La lastan semajnon mi spertis malagrablan senton, ĉar mi neniun renkontis, kiu ĵus legis iun ajn libron... Mi do krias: **Ni legu librojn!**

Mi ne rekomendas legi la plej longan libron en la mondo, ĉar malfacile estus ĉerpi plezuron legi ĝin dum kelkcent



vesperoj kaj ankoraŭ suferi, tenante ion tiel pezan. Tiu longa libro estas "The Collection, Obama and Pluralism" kaj ĝi havas 5 472 paĝojn.

Ĉeokaze mi aldonas, ke la plej malgranda libro en la mondo estas "Olda reĝo Cole", kiu havas nur 1 mm x 1 mm. Ĝi estis eldonita en la jaro 1985 de la eldonejo Gleniffer Press en Paisley, en Skotlando. Estis eldonitaj nur 85 ekzempleroj kaj por legi la libron oni bezonas kudrilon por foliumi ĝin. La plej populara libro en la mondo konstante estas la Biblio, sed la plej multajn (pli ol 600) librojn skribis en la tempoj de "ansera plumo" la polo Józef Ignacy Kraszewski.

Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekz. toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.




Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas specialan komikson (bildrakonton) de Janusz Christa “Kajko kaj Kokoŝo” en la lingvo Esperanto.

La 7-an de decembro 2017 la eldonejo Egmont eldonis esceptan eldonon de la fama komikso “Kajko kaj Kokoŝo – Trezoroj de Mirmilo” de la majstro de komikso Janusz Christa, en Esperanto. La komikson tradukis Przemysław Wierzbicki, la prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo.

La komikso rakontas pri du amikoj, Kajko kaj Kokoŝo. Kajko estas brava kaj prudenta, kaj Kokoŝo estas manĝegulo kaj egoisto. Ili ambaŭ gardas Mirmilon antaŭ malnoblaj rabistoj sub la komando de Hegemon. Legante la komikson vi travivos amason da amuzaj aventuroj.




Tiun Esperantan version certe ĝuste taksos esperantistoj en la tuta mondo.

Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj

Franca esperantistino Ginette Martin sendis al mi fabelojn de sia




afrika korespondanto Mana Namutema Brinson.

Tiel mi povis kune kun miaj geamikoj prepari la rubrikon, prezentante al vi la afrikan landon D. R. Kongo.

Mana Brinson sendis ankaŭ sian foton en la biblioteko de la Klubo de la Amikoj de Esperanto. Li havas edzinon Paskalina kaj filineton Espero.

Memoru: Unue per kelkaj informoj konatiĝu kun la nova lando. Klopodu trovi la menciitajn lokojn sur la mapo kaj poste faru la konkursaĵn taskojn.





Kio allogas min en la Demokratia Respubliko Kongo?

Demokratia Respubliko Kongo estas ŝtato en centra Afriko. Ĝia ĉefurbo estas Kinŝasa kaj ĝi estas la dua plej granda lando en Afriko, laŭ la areo.

Iam la respubliko estis kolonio de Belgio kaj nomiĝis Belga Kongo. Post la sendependiĝo ĝi estis nomita Respubliko Kongo, por poste ŝanĝi la nomon al Demokratia Respubliko Kongo (por distingi ĝin de la apuda Respubliko Kongo kun la ĉefurbo Brazzaville). La teritorio de la lando havas grandan geografian varion kaj tio kaŭzas, ke ĝi estas lando kun la plej granda biologia diverseco de nia planedo: la savano en sudaj regionoj, la humida ĝangalo en la montaraj regionoj de la oriento, la ĝangalo kaj la grandaj lagoj. La ĉefaj urboj krom la ĉefurbo estas Mbuji-Mayi, Kananga, Kolwezi, Goma kaj Lubumbaŝo. En la Demokratia Respubliko Kongo estas indikataj 214 lingvoj kaj dialektoj, sed la oficiala lingvo estas la franca. Ekzistas ankaŭ kvar naciaj oficialaj lingvoj: la konga, luba, svahila kaj lingala. Plejmulto de la loĝantoj portas mult-kolorajn vestaĵojn kaj la virinoj plej ofte portas longajn jupojn.




D. R. Kongo estas granda lando, kaj do malfacile estas paroli pri la nacia kuirarto.

Ekzistas multekostaj restoracioj, sed oni povas manĝi ankaŭ ĉe la strato. Oftaj estas boligigitaj ovoĵoj kun bulko kaj rostita viando. Valoras menciigi, ke en D. R. Kongo la socia sistemo fakte ne ekzistas. La medicina prizorgado estas tre malbona, publikaj sanecistemoj preskaŭ ne ekzistas, kaj ankaŭ la publika edukistemo fakte ne ekzistas (la gepatroj devas private pagi lernadon de siaj infanoj).

“Ekde 2006 kreskas vigla Esperanto-vivo en pluraj vilaĝoj kaj eĉ en urboj





Fabeloj

Karaj legantoj, mi proponas tralegi la sekvajn interesajn fabelojn, kiujn verkis Mana Namutema el D. R. Kongo.

La raŭpo kaj la heliko



La raŭpo iun tagon ŝoviĝis al la heliko. “Bonan tagon, najbaro mia”, ŝi diris, “aŭ prefere Kuzo

mia, ĉar ni ambaŭ rampas”.

“Mi, via parenco!?”, respondis sinjoro Heliko, “vere, vi ja sensece babilas. Fi! Kia malbela kreaĵo! Mi ne konas vin, olda frenezulo; foriru!” La raŭpo senvole malproksimiĝis. Iom poste belega papilio flugetis sur la florplena gazono. “Alproksimiĝu, amiko mia”, diris la heliko, “ni babilu kiel bonaj fratoj”. “Silentu, malnobla orgojlulo”, ekkriis la papilio.

“Mia brila flugilo plaĉas al vi, sed mi memoras, ke iam vi forpuŝis min senkompatate”. Dirinte tion, la ĉarma papilio forflugis, kaj la heliko, hontegante, reeniris en sian konkon.



La kato kaj la pasero

La kato kaptis paseron kaj prepariĝis por manĝi ĝin. La pasero diris al la kato: “Bone edukita kato ne manĝas antaŭ ol lavi al si la vizaĝon.” “Ĝuste”, respondis la kato, “mi tuj faros tion.”

Dume la birdo forfuĝis al branĉo kaj poste mokis la naivan kateton.

La kato ofendite diris: “Alian fojon mi unue manĝos, kaj poste lavos al mi la vizaĝon.”

Ĉiuj katoj en la mondo tiel faras ekde tiu aventuro.



de Suda Kivuo, en konekto kun grupoj en la najbaraj afrikaj ŝtatoj. Klubo de la Amikoj de Esperanto (KAE, vidu <http://kae-amikaro.info/>) estas esperantista asocio en Kiliba – vilaĝo, situanta en la provinco Suda Kivuo de D. R. Kongo. KAE estas ne nur esperantista asocio, sed ankaŭ komunumo de samideanoj, kiuj kredas, ke ni ĉiuj, agante kune laŭ la principoj de homaranismo kaj esperantismo, povas plibonigi la mondon. Tiu asocio prizorgas orfejon kun 200 orfoj (sur la suba bildo) kaj lernejon por georfoj (paĝo 20 sube), en kiu la reprezentantoj de KAE instruas interalie ankaŭ Esperanton. KAE posedas kelkajn kampojn; ĝia kultivado disponigas nutraĵojn kaj monrimedojn por la orfejoj kaj aliaj projektoj. Agas kaj helpas forte laboranta teamo de aktivuloj” – informas la gvidanto de KAE Mana Namutema Brinson, kiu lernis Esperanton de la konata esperantisto, nederlandano Hans Bakker. Joseph Conrad, verkisto kaj publicisto, en la jaro 1890 vizitis Kongon, navigante en vaporŝipo. Sub granda impreso, observante tiutempajn brutalajojn, li verkis la libron “Kerno de mallumo”.





La bufeto kaj la eta stelo



Sebastiano, la bufeto, sidis somer-vespere marĉostrande, kaj rigardis la ĉielon kvakante. Subite li klare vidis bluan steleton, kiu okulsignis al li. Li frotis siajn okulojn, denove rigardis: nenio plu! La steleto ŝajne rigardis aliloken por trovi alian admiranton.

– Kia bela ŝi estis, vere, tiu stelo! Li tuj decidis ŝin nomi “Blueta”.

Ŝi brilis, Blueta, brilis vibre, ardege. Pro tio li eĉ forgesis kvaki. Li ŝin okulvoris, ĝis li vidis stelojn ĉie, eĉ tie, kie neniu estis, fine enamiĝis la bufeto je Blueta.

Ĉiuvespere Sebastiano gvertis la steleton. Li eĉ forgesadis kvaki. Kelkvespere ŝi okulsignis al li: li tutcertis pri tio. Kaj multnokte nenio plu. Stranga ideo eniris lin, kaj tiu ideo daŭre maltranviligis lin. Li nepre volis steliĝi por povi ami Bluetan, laŭ la ununura maniero, digna por ŝi: la stelmaniero.

Li vizitis la plej maljunan ranon de la marĉeto. Ŝi estis senaĝa kaj estis, laŭdire, duonsorĉistino. Tio dependis de tio, kion oni petis de ŝi. Oni timis ŝin kaj vizitis ŝin nur ekstremokaze. Ŝi loĝis marĉetofine, en naŭza loko.

Sorĉfeino, tia estis ŝia nomo, diris al li: “Nu! Denove amanto, la deka kliento de la tago. Rakontu viajn malfeliĉojn”. Sebastiano rakontis sian historion. Sorĉfeino grumblis: “Ne banalaĵo. Mi tuj vidos, kion mi povas fari. Nu, dum mi pripensas, turnu la ĉerpilon en la kaldrono”.

Sebastiano, hororkaptita, alproksimigis la uĝegon, kiu vomige odoraĉis, li turnis la tutajon, bedaŭrante sian alvenon. Sorĉfeino ekkriis: “Mi trovis. Unue vi leporiĝos”. Ŝi aldonis pinĉprenon de pluraj pulvoroj miksaĵen: “Trinku, glutu unufoje, nur unufoje. Bufoti, bufota, lepori, lepora!” Sebastiano ne havis rifuztempon,

ĉar jam la ĉerpilo enfaŭkiĝis. Li glutis la aĉan miksaĵon, kaj eliris el la kabanaĉo. Li aliris sian plej amatan arbon, lastfoje li parolis al ĝi, por admiri sian stelon. Arde rigardante, li sentis strangajn tremojn en dolorigata dorso sia. Koncentriĝante al sia korpo, li malkovris deziregon por gigante salti. “Kial ne”, li diris al si, “tio eble helpos min”. Li do saltis kaj surteriĝis multe pli malproksimen ol li konjektis. Liaj kruroj gigante grandiĝis kaj li devis konfesi, ke li nun posedas enorman orelparon kaj voston. Fakte esti leporo ne aspektas malbone. Li trakuris la arbaron tutnokte, tute ekscitita kaj ĝoja. Frumatene li observis la ĉielon kaj vidis sian stelon, kiu ridetis, antaŭ ol malaperi. Tiam li denove aliris Sorĉfeinon. “Mi atendis vin”, ŝi diris. “Nun trinku”, ŝi diris novafoje, post kiam ŝi aldonis malsamajn ingrediencojn en la trinkaĵon. Sebastiano prenis iomete da ĝi kaj diris: “Mi havas problemon, mi nenion havas por pagi”. “Mi tion scias”, grumblis Sorĉfeino; “la plimulto de la marĉloĝantoj estas tiaj. Ĉiel, knabo mia, tio, kion ni faras, estas tre danĝera. Kaj mi ne certas, ke ni sukcesos”.



Li elkabaniĝis, ĉar li eksentis strangajojn. Liaj oreloj etiĝis, lia vosto longiĝis, flavruĝiĝis kaj pompiĝis. Li

estis vulpigita. Li plenplene esploris sian novan situacion, dank’ al siaj dolorantaj kruroj, traarbare, ĉiudirekten. Iom antaŭ la tagiĝo li rigardis ĉielen, kaj kun nenia eraro li vidis, ke Blueta turniĝas ĉirkaŭ si mem kaj okulsignas al li. Kiam la stelo paliĝis, li rapidis Sorĉfeinen. “Nu, jen vi”, ŝi diris. “Trinku.” Li glutis kaj foriris. Iom pli malproksime li haltis, ĉar korno kreskis liafrunte, lia bela vosto estis nur memoraĵo, kaj liaj sveltaj kruroj longiĝis. Lia potenca cervokorpo galopis sublune.



Kiam li funde esploris la ĉielon, ŝajnis al li, ke Blueta pli alproksimiĝis. Li aliris Sorĉfeinon. “Mi rimarkas, ke nia plano bonege funkcias. Trinku tri ĉerpilojn kaj eliru kiel eble plej rapide!” Li fulmkuris ĝis la maldensejo kaj pro doloro elefante blekis, levante samtempe sian tutnovan rostron. Li surtretis la arbarajn herbojn kaj voris la novajn foliojn de la arbopintoj. Li sin turnis en la marĉeto kaj sian korpon aspergis. Elfirmamente Blueta dufoje okulsignis al li. Ŝajnis al li, ke ŝi ankoraŭ pli proksimiĝis.

“Ĉi-foje devas esti!”, diris Sorĉfeino al la elefanto, kiu staris ekster la kabano, “Ĉu vi vere volas steliĝi?”

“Jes”, Sebastiano respondis. “Bone, tre bone, glutu la maksimumon, kiun vi kapablas”. Li alproksimigis la rostron kaj englutis la tutajn trinkeblan. Ŝajnis al li, ke liaj potencaj kruroj kuniĝis kaj fariĝis... Ne, ne eblis! Nu, jes ja, evidentiĝis: tutcerte li enradikiĝis. Ĉiuj liaj folioj admiris la steleton, kiu okulsignadis kaj ŝajnis vere grandigita.

Sorĉfeino per nova miksaĵo akvumis la malsupraĵon de la ŝvela trunko de



baobabo! Uragana vento ekis, ŝtonego ŝajne naskiĝis el la arbo, alfirmamentiris kaj trafis la lokon, kie sin trovis la steleto. Ŝi elĉieliĝis kaj falis, falis...! Blueta venis por serĉi Sebastianon, kiu finis sian transformiĝon ĝis steliĝo, tuj kiam ŝi alvenis. Blueta havis ŝveleton okul-loke. “Venu, ŝi murmuris”, kisante lian vangon tutnovan. “Mi jam delonge atendis vin! Sed venu je la horo por viziti la stellernejon. Ni estos samklase kaj ne maltrankviliĝu, mi helpos vin en via malfruiĝo”. Sebastiano lastfoje, rigardante la marĉeton, sekvis Bluetan ĝu-ravate...



La konkursa tasko estas jena: Unue trovu kaj tralegu aliajn informojn pri D. R. Kongo. Due – trovu la najbarajn landojn de sur la mapo. Skribu iliajn nomojn al ni. Trie, se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) prezentas la tekston de la fabeloj. La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30-a de marto 2018 al la adreso de la rubrikestrino.

La valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole *Europejskie Centrum Edukacji Międzycykturowej*).

Fine mi aldonas belajn versaĵojn de Jerzy Księski. El la pola lingvo tradukis Halina Kuropatnicka – Salamon.

Neĝas

Frua neĝ'.
Super ter' lulkanteto.
En arbar'
jam dormetas ursetoj.
Super kamp'
kaj en urbo neĝetas.
Flugas neĝ'.
Ĉio fine blanketas.
Dua neĝ'
de vesper' ĝis mateno;

tria neĝ'
- dormkanzona sereno.
Kvina neĝ'
ĉiuflanke ŝutiĝas.
Iras neĝ'!
Dekafoje blankiĝas.

Pri kio temas?

Kvankam iom vi tristiĝas,
kvankam ŝuoj du miksiĝas,
oni nomas vin: etulo!

Estu gaja, petolulo!
Senĉese ne koleretu.
Al paĉjo, panjo ridetu.
Je mondo ne ofendiĝu.
Senkaŭze ne ĉagreniĝu.
Se voj' estos kontraŭ vento,
se eĉ koto vin atendas,
vi marŝadu en sereno,
nur bravure de mateno.
Jam radias ĉiu ejo
- dom', lerneĵ',
vartolernejo...
Ĉu motivon vi ne scias?
Ĉiuj estas simpatiaj!





La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



**Kanto akompanas nin ĉie...
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi
helpas vidi kaj krei alimaniere
la mondon, permesas revii aŭ
transdoni niajn sentojn.**

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj rememoras la kanto-vortojn. Tiumaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi prezentas ĉi-foje la ŝatatan kanton de bretonaj infanoj "Kousk". Skribis ĝin en la jaro 1900 nekonata aŭtoro, kaj ĝin sendis Ginette Martin, franca legantino de nia revuo kaj esperantistino, kiu belege rakontas legendojn. Ginette speciale por nia rubriko tradukis la kanton.

Kousk

*Suno jam kuŝiĝis,
taghelo finiĝis,
la preĝon anoncis sonoriloj.
Dormu, ho kara Armorland'.
Nokto etendas la oran velon.
Por luli vin, la maro kisas vin
kaj kantigas la ondojn.*



Bonvolu respondi:

1. Kion faras la suno?
2. Kio finiĝis?
3. Ĉu sonoriloj anoncas ion? Se jes, kion?
4. Kiu etendas la oran velon?
5. Kion faras la maro?

Viajn respondojn sendu interrete al mi, por ricevi valorajn premiojn, kiujn fondis la pola organizo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

Bretonio estas regiono en la nord-okcidenta parto de Francio. Ĝi unue nomiĝis "Armoriko", do lando ĉe la maro. Tial en la kanto vi trovis la vorton "Armorlando".

Ré *Ré* *Mim*

Le so-leil s'est cou-ché De-jà le jour n'est plus Tous les clochers ont tin-
An heol a zo ku-zet Se-tu e-chu an-de Me-lev ar c'hlae'h ofi-

La *Ré* *7* *Sol* *La* *La* *Ré*

-te l'angé-lus Dors, dors O cher pays d'Armor! La nuit étend son voile aux perles d'or.
-nal an A-ve Kousk, kousk, Breiz l-zel, bro dis-par! Se tu an noz a tout veur an dou-ar

Ré *7* *Sol* *La* *La* *7* *Ré*

Dors! Pour bercer ton re - pos La mer t'embrasse et fait chan-ter le flot.
Kousk! Breiz l-zel! bro ken mat! Trouz ar mor bras a zav d'az Ins - kenl - lat.





Malstreĉiĝu kun *Juna Amiko*

La paska ovo mem farita...

Mi proponas al vi dediĉi iom da tempo al kreado de paska ovo. Laŭ tiu modelo vi povas prepari ankaŭ aliajn elpensitajn aĵojn.

Mi proponas tiel pasigi tempon, ĉar tiu laboro estas bona ludo, sed antaŭ ĉio ĝi montras la riĉecon de niaj talentoj kaj de niaj imag-kapabloj. Ĝi ankaŭ instruas al ni paciencon, kreivan pensadon, la eluzadon de ofte senutilaj aŭ nebezonaĵaj materialoj, sed ankaŭ faras nin sendependaj de televido aŭ de komputilo – kaj do promocias sanan vivmanieron. Mi instigas vin al unika investo, kiu alportas nur gajnon.

Mi petis studentinon de la Esperanto-kurso, ege talentan personon, Grażyna Bosek, ke ŝi preparu kaj priskribu, kiamaniere prepari paskan ovon.

Grażyna okupiĝas pri multaj artaj aferoj, ŝi pentras, desegnas, trikas, ornamas per “*decoupage*” (buŝtuka tekniko). Ŝi ankaŭ multe legas kaj ŝatas vojaĝi, ekkoni novajn lokojn kaj kuirartojn, sed ŝi pleje amas siajn genepojn.

Ŝi proponas eluzi tiun specialan teknikon. Provu do fari similan ovon kiel donacon



por viaj proksimuloj, aŭ ion alian, laŭ viaj propraj ideoj, eluzante eĉ la plej mirigajn materialojn.

Materialoj:

La plej grava parto de la ovo estas du travideblaj kaj akrilaj partoj, kiujn oni devas aĉeti. Vi bezonas ankaŭ buŝtukon kun belaj desegnaĵoj, gluon por ligno, penikon, rizan paperon (aŭ blankan akrilan farbon), dekoracian rubandon, mallarĝan rubandon kaj larĝan velur-rubandon.


Priskribo de la realigo:

El la buŝtuko oni devas eltranĉi desegnaĵojn. Sekve el tiuj eltranĉitaj partoj oni devas demeti tavolon post tavolo, por ke estu nur la tavolo kun la desegnaĵo. Tiun delikatan parton atenteme, per peniko, engluu ene de unu duono de la ovo. Iom atendu kaj dum tiu tempo disŝiru rizan paperon je ne tro malgrandaj pecoj. Tapetu per la pecoj de riza papero la enon de la duono de ovo, kovrante la desegnaĵon. Faru la samon pri la alia duono de la ovo. Kiam vi jam havos pretajn la du duonojn, kunmetu ilin,

kaj la linion de kunmeto kovru per dekoracia rubando. Supre gluu mallarĝan rubandon kiel pendigilon, kaj ĉirkaŭe algluu faritan kokardon el larĝa velur-rubando.

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj ŝatokupoj, kun la priskribo, ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblon ekkoni ilin.





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_espero@mail.ru



Filmfestivalo "Teo kaj Amo"

Saluton, karaj legantoj!

Ni tre ĝojas saluti vin jam en la Nova jaro – kaj tutanime gratulas ĉiujn okaze de la veninta jaro 2018! Sanon, prosperon kaj pacon al vi ĉiuj, niaj karaj samideanoj! *Interkultura Mondo* esperas, ke vi tre bone pasigis la festajn tagojn!

Do, kion ofte faras homoj dum festa tempo? Kune teumas kaj babilas, ĉu? Sendube, tiu tradicio estas tre ŝatata tra la mondo sendepende de la nacieco kaj nacia kulturo. Sekve, teo – tre diversspeca – estas vere internacia kaj interkultura trinkaĵo, ĉu? Do, tiukaze hodiaŭ ni ankaŭ invitas vin teumi... Esperantan teon!

Temas pri la tre interesa projekto de Ĉina Radio Internacia (CRI) – nome ĝia Esperanto-redakcio – la konkursa

filmfestivalo "Teo kaj Amo". La ideo naskiĝis en 2014 danke al la kultura programo ĉe Ĉina Radio Internacia kaj, sendube, tute ne hazarde. Vi certe scias, karaj legantoj, ke Ĉinio estas la naskiĝlando de teo. La ĉina tea kulturo kalkulas jam preskaŭ 3 milojn da jaroj! Dum tiu longega tempo formiĝis unikaj te-ceremonioj, kiuj estas nun unu el la naciaj heredaĵoj de Ĉinio. Ĉinoj ne nur volonte trinkas teon mem kaj regalas siajn gastojn. Ili kreis veran tean arton, verkis multajn librojn pri teo. La plej malnova kaj rara estas "Libro de teo", verkita en la 780-a jaro de Lu Yu, ĉina poeto. Imperiestro de la Song-dinastio (960-1297), kiu tre ŝatis trinki teon, establis en sia palaco institucion pri teo. Ĉe la paĝaro de ĈRI vi povas legi pri la dek plej famaj teoj en Ĉinio.

La unua konkurso de Ĉina Radio Internacia nomiĝis "Teo kaj Amo". Ĝi estis anoncita somere 2014 dum la jubilea 70-a



Premiodona Ceremonio en la teatro de Dushan. Fotoj: Verda Stacio



Profesiaj
prezidistoj
el CRI el Pekino

Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Fortalezo, Brazilo. Partoprenis en “Teo kaj Amo” 45 filmoj el 20 landoj. Aŭspiciis la konkurso Universala Esperanto-Asocio. La internacia jurio konsistis el la Prezidanto de UEA Mark Fettes, la estrarano Lee Jungkee kaj ĉinaj fakuloj pri te-kulturo kaj filmfarado. Estis aljuĝitaj 10 unuaj premioj, 12 duaj kaj 20 triaj. Krome la jurio donis premiojn por la 10 plej ŝatataj filmoj de la publiko. Kaj estis aldonitaj 3 specialaj premioj: por originala kanto, por dokumenta filmeto de te-kulturo kaj por la plej promesplena reĝisoro.

La premiodona ceremonio okazis en aprilo 2015 en la granda te-ekspoziciejo de la urbo Hangzhou. Partoprenis la ceremonion ne nur festivalanoj, sed ankaŭ ĉeestantoj el la ekstera publiko. La laborlingvoj estis la ĉina kaj Esperanto. Dum la ceremonio la ĉeestantoj spektis filmojn de ĉiuj premiitoj. La gajnintoj ricevis honorajn diplomojn en solena etoso. Gratulparolis al la ĉeestantoj la Prezidanto de UEA Mark Fettes. La etoso de la aranĝo estis tre fruktodona kaj kortuŝa. Festivalanoj konatiĝis kun la riĉa

ĉina kulturo, vizitis kelkajn vidindaĵojn de la Subĉiela Imperio, kiel oni nomas Ĉinion. Kaj, certe, ekhavis novajn amikojn kaj neforgeseblajn rememorojn!

Post tiu granda sukceso Ĉina Radio Internacia decidis okazigi la duan filmkonkurson. Ĝi ricevis la saman nomon “Teo kaj Amo” kaj pasis en la jaroj 2016-2017.

Kiel kaj kial estis unuigitaj tiom neproksimaj vortoj, kiel “teo” kaj “amo”? Jen kiel tion klarigas la organizantoj: “Amo” estas ne nur la profundaj rilatoj inter la viro kaj la virino, sed ankaŭ pli ampleksa kaj pli granda, ekzemple, amo de la gepatroj, amo inter gefratoj, amo inter amikoj, amo al naturo, amo al paco, amo al legado, vojaĝo, Esperanto, literaturo, sporto.

Do, tiu nomo iĝis la ĉiama titolo de la filmkonkurso kaj filmfestivalo de CRI, same kiel ekzemple Oscar-filmfestivalo aŭ Cannes-filmfestivalo. Enkadre de la ĉefa temo por la konkurso ekzistas variaj subtemoj.

Jen kiel alvokas la organizantoj ĉe la paĝaro de Ĉina Radio Internacia: “Kiel nia lingvo Esperanto, teo povas roli kiel perilo por amo. Foje diris Julio Baghy (la fama



Lernantoj de la Elementa Lernejo
en Zhenjiang, kie oni lernas Esperanton.



Filmado en la Elementa
Lernejo en Zhenjiang.

Fotoj: Verda Stacio



La ĉeforganizanto Goja kaj la prezidanto de UEA Mark Fettes

hungara esperantisto): “Amo kreas pacon, paco konservas humanecon, kaj humaneco estas la plej alta idealismo”. **Amo estas kerno de nia lingvo Esperanto.** Kaj Teo, kiun trinkas ĉiutage du trionoj de la monda loĝantaro, estas la magia trinkaĵo, kiu vekas energion kaj iniciatas la vivmanieron de paco kaj amo. Tion celas ankaŭ nia lingvo Esperanto”. – Belaj kaj veraj vortoj, ĉu?

La 2-an Internacian filmkonkurson de Mallongaj Filmoj “Teo kaj Amo” partoprenis jam 79 filmoj el 27 landoj de 4 kontinentoj. Post faka juĝado naskiĝis 27 filmetoj por ĝeneralaj premioj, 9 fakaj premioj, 3 filmetoj por specialaj premioj kaj 10 filmetoj por La premioj de la publiko. La premiodona ceremonio okazis la 26-an de oktobro 2017 en la gubernio Dushan de Guizhou-provinco. Ĉeestis la ceremonion ne nur altrangaj gvidantoj de Dushan, sed ankaŭ s-ro Ren Qian, vicdirektoro de Ĉina Radio Internacia, d-ro Mark Fettes, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj s-ino Margaret Zaleski-Zamenhof, pranepino de d-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto.

Dum la ceremonio la premion ricevis la premiitoj de diversaj kategorioj de la konkurso. Donitaj estis ankaŭ diplomoj de la anĝeloj, t.e. kvazaŭ ambasadoroj, de “Teo kaj Amo” kaj tiuj de la urboj de “Teo kaj Amo”. La publiko inkluzivis ne malmultajn loĝantojn de Dushan. Ili ĝuis ne nur la filmetojn mem, sed ankaŭ Esperanto-muzikon de la litova muzikgrupo Sepa Asorti. Okazis interesa diskutado pri la premiitaj filmoj.

Ĉi-foje la 2-a Internacia filmkonkurso “Teo kaj Amo” inkluzivis jam serion de diversaj fest-arangoj. En oktobro 2017, tuj antaŭ la konkurso, oni organizis karavanon “Teo kaj Amo”. Ĝin partoprenis esperantistoj el Ĉeĥio, Ĉinio, Rusio, Usono kaj Slovakio. Ili vizitis interalie kelkajn lernejojn. Unu estis Baotalu-Elementa Lernejo de la urbo Zhenjiang de la provinco Jiangsu. Tiu elekto kompreneble ne estis hazarda. La lernejo Baotalu havas longan tradicion de Esperanto-edukado. Estro de la lernejo s-ro Xu Qiang konigis, ke jam en la jaro 1993 la lernejo komencis kurson de Esperanto kaj fondis grupon pri Esperanto. Lastajn jarojn la lernejon vizitis multaj eksterlandanaj esperantistoj el Usono, Sud-Koreio, Francio, Italio, Britio kaj Brazilo. Kaj certe ĉinaj esperantistoj estas oftaj gastoj en la lernejo. Dum la vizito de la karavananoj la lernejoj spektis filmetojn de “Teo kaj Amo”, prezentis voĉlegadon kaj ludis tradician muzikon de Ĉinio.

Alia vizito okazis al la ŝanhaja lernejo de blindaj infanoj. La karavananoj konatiĝis kun la lernejoj, kun ilia vivo kaj lernado. La lerneja orkestro prezentis nacian muzikon. La lernejoj kaj gastoj kune kantis, dancis kaj tre gaje pasigis tempon.

Aliaj gravaj kaj interesaj arangoj dum la 2-a Internacia filmkonkurso “Teo kaj Amo” estis prezentado de mallongaj filmoj kaj ekspozicieto de ilustraĵoj celebre al Zamenhof-Tago kaj la 130-a datreveno de Esperanto en Pekino. Krome, en la sama tago – la 14-an de decembro 2017 – en Pekino estis oficiale lanĉita la Esperanta





Komuna fotado kun membro de la Esperanto-Klubo en la urbo Zhenjaiang.

Fotoj: Verda Stacio

libro “Teo kaj Amo, rakonto pri Teo”. La libro estis eldonita memore al L. L. Zamenhof tuj antaŭ lia naskiĝtago, kaj al la 130-a datreveno de publikigado de la unua libro de Esperanto. Partoprenis la solenan celebradon Ragnar Baldursson, plenrajtigita sendito de Islando al Ĉinio, Wang Xingdong, membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, estro de Ĉina Film-literatura Asocio, vicprezidanto de Ĉina Filmista Asocio, Hu Kaimin, vicdirektoro de Fremdlingva Eldonejo, Wang Xufeng, verkisto, gajninto de ĉina literatura premio Maodun kaj estro de kultura akademio sub Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato, Lee Jungkee, speciala sendito de Universala Esperanto-Asocio, estrarano de UEA kaj Prezidanto de Seula Esperanto-Kulturcentro kaj diversrondaj gastoj kaj esperantistoj. La eventon organizis Ĉina Radio Internacia kaj Fremdlingva Eldonejo, funkciigas Centro



pri Homresursoj de CRI kaj Pekina Esperanto-Asocio, subtenis ĝin UEA, Piktura kaj Kaligrafia Studio de Zhengshantang-kompanio, CRI sur interreto, Ĉina Novaĵo kaj Ĉina Televido.

La libro estas kompilaĵo de artikoloj, verkitaj de diverslandaj esperantistoj, parto de la projekto “Teo kaj Amo”. Ĝi rakontas pri la konkurso kaj kolektis impresojn, emociojn de te-amanoj. La libron redaktis Zhang Ping (Ĝoĵa), ĵurnalisto de Ĉina Radio Internacia, kiu kuniniciatis la projekton “Teo kaj Amo”, kungvidis du konkursojn “Teo kaj Amo” kaj kunplenumis la parton de la filmofestivalojn “Teo kaj Amo”. La 312-paĝa libro estis eldonita de Fremdlingva Eldonejo.

La libro estas dividita en kvar partojn. La unua, “Teo kaj Amo”, prezentas teon kaj la projekton “Teo kaj Amo” per interesaj rakontoj. Ili klarigas, interalie, pri la ĉina ideografiaĵo 茶 (*pinyin cha*, Esperante *teo*), la ĉina





te-etiketo, Teo kaj Amo kaj prezentas tagnotojn de alilandaj partoprenantoj de la unua filmfestivalo “Teo kaj Amo”.

La dua parto, titolita “Urboj de Teo kaj Amo”, prezentas la urbojn Hangzhou, Jingning kaj Dushan en Ĉinio, Visaginas en Litovio, Nový Jičín kaj Svitavy en Ĉeĥio, kaj Bjalistoko kaj Bielsko-Biala en Pollando.

En la tria parto, Anĝeloj de “Teo kaj Amo”, la partoprenintoj de la filmkonkurso “Teo kaj Amo” rakontas pri siaj spertoj, aŭ prezentas la tekstojn de siaj filmetoj. En tiu parto ankaŭ troviĝas intervjuo de Ĝoja al la revuo *Kontakto* 274 (2016/4), tekstoj de kantoj, uzitaj en muzikfilmoj, faritaj por la filmkonkurso. Artikolo de Lee Jungkee, estrarano de UEA kaj membro de la jurio de la konkurso “Teo kaj Amo”, enkondukas tiun ĉi parton de la libro kaj prezentas la gravecon de tiu konkurso.

La lasta parto de la libro, “Vortoj de Teo kaj Amo”, prezentas fotojn kaj subskribojn de la kunlaborantoj el pluraj landoj. Apud ĉiu foto legeblas la frazoj “Teo kaj Amo”, “Ĉu vi trinkis teon hodiaŭ?” kaj “La mondo pleniĝu de tea aromo!” en la denaska lingvo de tiu persono, kiu ankaŭ kontribuis per frazo, legebla en la denaska lingvo kaj ankaŭ en Esperanto.

Dum la celebra prezentado de la libro surloke okazis te-ceremonio kaj teo estis disdonita al la ĉeestantoj. Lee Jungkee laŭtlegis gratul-leteron de la UEA-prezidanto Mark Fettes. Ĝoja laŭtlegis gratulan mesaĝon de D-ro Maryse Wanda Zaleski-Zamenhof, pranepino de la iniciatinto de Esperanto. Chen Ji, vicdirektoro de “El



Popola Ĉinio”, laŭtlegis gratulmesaĝon de Zhao Jun, vicĉefredaktoro de “El Popola Ĉinio”. Krome, infanoj de pekina Elementa Lernejo Yongtai prezentis skeĉon pri ranidoj, kiuj serĉas la patrinojn. Sekve estis prezentitaj la filmoj “La Plej Juna Krimulo” (Irano) kaj “Simpla Rakonto” (Rusio). La lasta programero estis aŭkcio. Samtempe gastoj ricevis donacetojn de la lernejoj de la Baotalu-elementa lernejo en la urbo Zhenjiang.

Eblas jam certe diri, ke “Teo kaj Amo” iĝis ne nur projekto de la organizantoj, Ĉina Radio Internacia, sed ankaŭ kampanjo de la tuta Esperantujo. Ja verbadon de konkursaĵoj helpis Esperanto-unuiĝoj el diversaj mondopartoj: ekzemple Seula Esperanto-Kulturcentro, Brazila Esperanto-Ligo, Brazila Esperantista Junulara Organizo. Krome, multas volontuloj tra la tuta mondo, titolitaj “te-amo-anoj”. Ili varbas konkursaĵojn, partoprenas konkursojn, helpas en tradukado, filmado, muntado, aldonado de tekstoj kaj aliaj, kiel senditoj reklamas agadon al la ekstera publiko. Inter la partoprenantoj de la konkursoj estas ĉina Tianjin-a Esperanto-Asocio, Indonezia Esperanto-Asocio, Vjetnama Esperantista Junulara Organizo, svisa Laŭzana Esperanto-societo, Moskva Esperanto-Asocio MASI. Pekina Esperanto-Asocio prezentis filmetojn jam en kelkaj ĉinaj urboj: Hangzhou, Tianjin, Qingdao, Jianguyuan. Krome, “Teo kaj Amo” kiel sukcesa internacia projekto de Ĉina Radio Internacia estis prezentita en Suda Koreio,



dum la 102-a Universala Kongreso de Esperanto julie 2017 en Seulo.

Subtenas tiun sukcesan internacian kaj interkulturan projekton diversaj organizoj. Inter ili estas, ekzemple, Ĉina Internacia Te-Kultura Instituto kaj Monda Film-Unio. Inter la aŭspiciantoj estas: Universala Esperanto-Asocio, Ĉina Teo-Sciencasocieto, Ĉina Film-Literatura Asocio, Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato, Zhejiang-a Filmista Asocio, Hangzhou-a Asocio por Popularigi Te-Markon, Mark-Akcela Asocio. Asistas: Zhejiang-a Filmista Asocio, Akademio Kultura sub Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato.

Se kompari la du pasintajn internaciajn filmkonkursojn, eblas fari jenajn konkludojn. La unua: preskaŭ duobligis la nombro de la konkursaĵoj kaj pliiĝis ankaŭ la nombro de la landoj de la konkursantoj. Pro tio la temo plivastiĝis kaj pliprofundigis. La dua: tre altiĝis la specialeco de la konkursaĵoj kompare kun la unua konkurso. Tio enkorpiĝas en lertaj kinolingvoj de la elstaraj verkoj. La konkurso estos neanstataŭigebla inter la film-konkursoj. La lasta: estas pli profunda la interpreto pri Teo kaj Amo. Teo estas ne nur la vivomaniero, sed ankaŭ vivokredo kaj kultura signoj, kiu troviĝas en ĉiutaga vivo kaj apartenas al la tuta homaro. Tiel resumis unu el la organizantoj de la Internacia filmkonkurso "Teo kaj Amo".

La filmfestivalo "Teo kaj Amo" havas tre favorajn regulojn kaj kondiĉojn. En ĝi rajtas partopreni profesiaj kaj amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, amaskomunikiloj, studentoj kaj kreemuloj el la tuta mondo. La aliĝo al la konkurso estas senpaga. Ĉiu filmo devas rilati al la temo "Teo kaj Amo", teo kaj amo devas esti ligitaj. Ĉiu filmo devas esti mallonga kaj daŭri 2- 15 minutojn. Estas permesataj desegnofilmoj, muzikfilmoj, dokumentaj filmoj, teatraj filmoj kaj aliaj. Uzeblas iu ajn aparato por filmado, ekzemple poŝtelefono, filmkamerao kaj similaj. Ĉiu lingvo de la mondo povas esti uzata. Ĉiu partoprenanto (persono aŭ

teamo) rajtas sendi pli ol unu konkursaĵon. Ĉiu konkursaĵo rajtas gajni plurajn el la premioj. Estas starigitaj kelkaj premioj: Plej bona filmo, Plej bona scenaristo, Plej bona reĝisoro, Plej bona desegnofilmo, Plej bona originala muziko, Plej bona ĉefaktoro, Plej bona ĉefaktoro, Plej bona kameraisto, Plej bona muntisto. Okazas ankaŭ Interreta Voĉdonado pri 10 premioj. Fina juĝo konsistas el Aljuĝo de ĵurio kaj Interreta Voĉdonado. Pri la fina juĝado respondecas la ĵurio, konsistanta el estrarano(j) de UEA kaj fakuloj el kampoj de te-kulturo kaj filmfarado el Ĉinio.

Jen estas ĝeneralaj reguloj. Ĉu ili interesas vin, karaj legantoj? Se jes, nepre partoprenu la konkurson! Ĝi estas valora kaj alloga por ĉiuj!

Interkultura Mondo kore gratulas ĉiujn gajnintojn, partoprenantojn kaj organizantojn de la Internacia filmkonkurso "Teo kaj Amo" kaj deziras al tiu perfekta projekto de Ĉina Radio Internacia pliajn prosperon kaj sukcesojn! Ja tiu iniciato de CRI celas montri al la mondo, ke ***Esperanto estas viva, utila, unuiga kaj eĉ profitodona lingvo!*** Do, partoprenu la konkurson kaj ***ĝuu la Verdan Esperantan teon!*** Ĉiun informon vi povas facile trovi ĉe la paĝaro de CRI <http://esperanto.cri.cn>. Sekvontnumere Interkultura Mondo daŭrigos la temon kaj rakontos pri unu el la gajnintoj, kunorganizanto kaj filmisto de "Teo kaj Amo".

Interkultura Mondo esprimas koran dankon al la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia pro la uzitaj materialoj!



Partoprenantoj de la filmfestivalo en la Ŝanhaja Universitato de Fremdaj Lingvoj.





Nomoj kaj arboj

Mireille Grosjean

Salikoj abundas sur nia planedo kaj en nia movado

Unue sin prezentas al vi
Sinjorino Raita Pyhälä
el Finnlando.

Mia finna persona nomo Raita ne signifas ĝenerale “saliko” sed oni uzas ĝin pri sovaĝa nordia specio “*salix caprea*”, kiu havas stameno-arbojn kaj pistilo-arbojn aparte.

Ĝi ne estas speciale bela, krom la stameno-arboj en aprilo – majo, kiam ili flave “floras”. Antaŭ tio aperas la blankaj amentoj, kiujn finnoj nomas “*pajunkissa*” (salikaj katoj). Ni kolektas la branĉojn en la



paska tempo por ornamu la hejmon. Tiam nenio alia ankoraŭ montras printempon en la vintra naturo. Tiu ĉi specio de salikoj nutras la unuajn printempajn burdojn, abelojn, papiliojn kaj aliajn insektojn, kiam ili vekiĝas por serĉi polenon kaj mielon. Raita estas malnova virina nomo. Miaj gepatroj elektis ĝin por mi, ĉar ĝi estas vere finna, ne iu finnigita formo de fremdlingva nomo. Nuntempe ĝi estas sufiĉe malofta. Multaj familioj nun preferas internaciajn nomojn.

Mi esperantistiĝis post mia 50-a vivojaro en la 1990-aj jaroj. Tiam mia loka biblioteko ne havis iun ajn sciigon aŭ libron pri aŭ en Esperanto. Tiam ankoraŭ ne la interreto funkciis kiel nun. Poste Esperanto tute sorĉis min, mi obstine serĉis lernolibrojn kaj homon, kiu povus montri al mi, kiel prononci la ĉapelitajn literojn. Mi partoprenis somerajn kursetojn, studadis sola hejme, korespondis, pruntis librojn, abonis gazetojn. Iom post iom mi progresis kaj povis mem ekkonsili kaj instrui



komencantojn. Multe helpis min, ke mi jam estis studinta aliajn lingvojn universitate, i.a. la francan. Esperanto fariĝis por mi tre grava kaj kara, ĝi ŝanĝis tutan mian mondkoncepton kaj donis al mi plurajn diverslandajn geamikojn, konatigis min kun geverkistoj, kiujn mi antaŭe ne konis. Dankon al L. Zamenhof pro la “bona lingvo”.

Mirejo notas: tiuj belaj salikaj amentoj nomiĝas ankaŭ en la franca “katidoj”, “*chatons*”.


Kaj nun ni iru al Japanio. En tiu lando en la urbo Toyota loĝas paro, gesinjoroj Kuroyanagi. “*Yanagi*” signifas “saliko”. “*Kuro*” signifas “nigra”. Do ilia nomo signifas “nigra saliko”. Ankaŭ ili prezentas sin dirante “Saliko”. En la granda familio de salikoj estas diversaj specoj, unu havas la nomon “nigra saliko”. Tamen ĝi ne estas nigra. En la jaro 2012 mi vizitis gesinjorojn Kuroyanagi en ilia domo en la urbo Toyota.



Jen foto kun ni tri en ilia belega ĝardeno. Maldekstre ŝi: Humiko. Dekstre li: Yoshitaka.

El Japanio ni revenu al Eŭropo kaj ni trovas la vorton “Weide”, kiu signifas en la germana “saliko”.

Peter Weide estas germana denaska esperantisto. Li naskiĝis la 20-an de Marto 1947 en Århus, Danlando. Liaj gepatroj estis August Weide kaj lia edzino Edith. Ekde 1948 li vivis plejparte en Hamburgo. En la jaro 1956 li estis



unu el la partoprenantoj de la Infana Kongreseto en Kopenhago. Jam dum siaj lastaj jaroj kiel gimnaziano li komencis instrui Esperanton en vesperlernejaj kursoj. Li ekde 1970 studis historion kaj pedagogion ĉe la hamburga universitato por poste labori kiel instruisto. Inter 1976 kaj 1982 li estis sekretario de la Hamburga Esperanto-Societo. Kune kun sia unua edzino li iniciatis tiun evoluon, kiu gvidis al la aĉeto de la klubdomo por la Hamburga Esperanto-Societo en la jaro 1979. Li estis la unua, kiu tradukis la Esperanto-lerolibron laŭ la Zagreba metodo en la germanan. Tiu traduko aperis en 1981. Lia traduko de “*Chruschtschows dritter Schuh*” (Heinz-Georg Macioszek) aperis en 1996 sub la titolo “La tria ŝuo de Ĥruŝĉov”. En 1998 li transloĝiĝis al Melby en Danlando. Ekde 2003 li aktivas kiel lingvohelpanto kaj tradukanto ĉe la reta kurso www.lernu.net. Li reverkis kaj modernigis la danan “ŝlosilon” en 2004. En 2006 li kompilis malgrandan Esperanto-gramatikon por danlingvanoj. Tiu kajero ekde 2011 ekzistas ankaŭ en germanlingva versio kaj ekde 2014 en la anglalingva. Ekde julio 2016 haveblas ankaŭ la itala versio.

Ni povas observi, ke ekzistas multaj vortoj por “saliko” en diversaj lingvoj: En la germana: *Weide*. En la finna: *Raita*. En la japana: *Yanagi*. En la franca: *saule* [sol]. En la angla: *Willow*. La botanikistoj solvas la problemon, uzante inter si la latinan. En la latina saliko estas *salix*.



Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...

Ŝi sidis ĉe mi ĉe mia granda tablo kaj ni kune trinkis teon. Temis pri tre agrabla momento, gaja kaj interesa.

Fakte mi apenaŭ konis ŝin antaŭe, do okaze de tiu teumado ni povis vere konatiĝi. Ŝi nun loĝas en mia vilaĝo, sed ŝi tiam rakontis pri sia infaneco en Italio, najbara lando de mia lando Svislando.

En la momento de sia foriro ŝi stariĝis, same mi, kaj ni kune iris tra la loĝejo al la elirpordo. Mi observis, ke ŝia seĝo restis



Italio fotita el satelito.
Foto el Vikipedio.



for de la tablo. Ŝi ne remetis la seĝon sub la tablon, laŭ la maniero, laŭ kiu miaj gepatroj edukis min. Do tuj mi pensis: ŝi estas malbone edukita.

Oni povus kredi, ke ŝi legis en miaj pensoj. Ŝi spontanee klarigis: “Ĉe ni en Italio, se iu sentis sin ne bone en iu nova loko, li/ŝi remetis la seĝon sub la tablon kaj tio signifas: mi ne ŝatus reveni. Male mi lasis mian seĝon for de la tablo, tio signifas laŭ mia kulturo, ke mi emus reveni. Fakte nia interparolado plaĉis al mi, mi sentis min kore akceptita. Mi tre dankas al vi. Do espereble ĝis baldaŭ! Kaj ankaŭ vi venu al mia domo.”

Tiam mi pensis, ke estis vere pozitiva fakto, ke ŝi klarigis sian konduton. Se ŝi estus dirinta nenion, mi restus ĉe mia negativa juĝo pri ŝi. Do paroli helpas al interkompreniĝo.

Mi povis tiel malkovri eron de alia kulturo, de itala kulturo (de iu preciza parto de Italio) kaj konstati, ke mia negativa impresoj pri ŝi estis tute erara, ĉar mi interpretis ŜIAN konduton laŭ MIA kulturkodo.



MIR, LA PLUŜ-ANASIDO



Bildserio de Liette Lêla kun teksto de Luiza CAROL

Sed unu tagon, venis spertulo kiu kontrolis ĉiujn ludilojn. Li decidis, ke la anasido estas difekta, ĉar li rigardas nur flanken. Li forĵetis la anasidon en la rubujon.



Sed la eta anasido ektimis ke oni denove forĵetus lin. Li kaŝis sin malantaŭ taso, kaj la virino tute ne rimarkis lin. La anasido restis sennoma kaj senpreza, sed tio ne ĝenis lin. Ankaŭ liajn amikojn tio ne ĝenis.



La knabo sidis maldekstre de la ludil-bretaro kaj rigardis ĉiujn pluŝ-bestojn envicigitajn tie. Dume, ĉiuj pluŝ-bestoj rigardis rekten, krom la anasido kiu rigardis flanken, ĝuste en la direkton de la knabo.



Foje, eta pluŝ-anasido naskiĝis en fabriko pri pluŝ-bestoj. Ĝi naskiĝis kun sia kapo ĉiam turnanta dekstren. Mi ne scias kial. Ankaŭ li ne scias kial. Li kapablis rigardi nur dekstren, sed tio tute ne ĝenis lin. Li amikiĝis kun du aliaj nov-naskitaj pluŝ-bestoj: urso kaj elefantino. La urso kaj la elefantino kapablis rigardi nur rekten, sed tute ne ĝenis lin la fakto, ke ili malkapablis rigardi flanken.



En la vendejo, la ludilojn akceptis virino, kiu alkröfis al ĉiu ludilo etiketon. Ŝi elpensis po unu belan nomon por ĉiu pluŝ-besto. Ŝi skribis sur ĉiun etiketon la nomon kaj la prezon de la koncerna pluŝ-besto. La urson ŝi nomis Bon kaj la elefantinon ŝi nomis Roz.



Unu tagon, eniris la ludil-vendejon eta knabo kun sia patrino, sia patro kaj sia pli aĝa fratino. Tiam estis ĝuste la naskiĝtago de la knabo. La patrino, la patro kaj la fratino intencis aĉeti por li po unu ludilon. La knabo tre ĝojis sciante, ke li baldaŭ ricevos entute 3 ludilojn, de li mem elektotajn.



Li volas ludi kun mi. Li estas ĝuste kun li mi volus ludi.





Mi volas nomi lin Mir, ĉar li estas mirinda,
Li havas apartan manieron rigardi. Jen, li
rigardas nun al la urso kaj al la elefantino.
Kaj li brakumas ilin.
Li havas apartan manieron brakumi,
Li amas ilin kaj ne volas separiĝi de ili.



La patro kaj la patrino aĉetis por la knabo
la urson Bon kaj la elefantinon Roz.




La anasido Mir iris al la knabo senpage.



Al la fratino restis mono, per kiu ŝi
aĉetis mielkuketojn, bongustajn kaj
sanigajn. Tiujn ili manĝis kune.



Bon, Roz kaj Mir troviĝas ankaŭ nun en tiu
familio kaj ĝuas belan tempon kune.




Sed... tiu anasido
havas nek nomon
nek prezoni! Kia?



Kiu anasido? Ah...
hmm... vidu... se
hmm... 2 aliajn
vi aĉetos 2 aliajn
pli aĉetos. Vi
ricevos ankaŭ tiun
riĉevos ankaŭ tiun
ĉi senpage. Kaj vi
nem decidos pri
lia nomo.




Virbovo kaj leporo



Foje virbovo manĝis kreskaĵojn sur kampo.
Tiam li vidis leporon, kiu kuris tre rapide. Li tre
bedaŭris, ke ankaŭ li ne povas tiel rapide kuri.



Kiam ili denove renkontiĝis, la virbovo diris:
"Feliĉa vi estas, leporo, ĉar viaj piedoj
estas tre rapidaj.



Vi povas forkuri
de ĉiuj malamikoj.
Mi ŝatus esti tiel
rapida."

La leporo ekridis kaj respondis: "Amiko mia, ne
estas bone esti rapida. Mi plezure interŝanĝus
mian rapidecon kontraŭ viaj fortaj kornoj.

Estas pli bone
kuraĝe batali
kontraŭ la
malamikoj,



ol la tutan
vivon
forkuradi
de ili".



Luiza Carol:

Ludoj taŭgaj por ĉiuj esperantistoj

“107 kruĉenigmoj en Esperanto” de Stano Marĉek. Ilustraĵoj de Stano Markoviĉ kaj Linda Marĉeková. 2008, 27 x 19 cm, 90 paĝoj. Ankaŭ sur KD en pdf-formato, kun la solvoj.



Homoj je ĉiuj aĝoj kaj je ĉiuj niveloj de la lingvo ŝatas amuziĝi per kruĉenigmoj, ĉu ofte ĉu nur foj-foje.

Kaj se tamen ekzistas iuj, kiujn tiu ludo enuigas, tiuj vere ŝanĝus sian opinion provante almenaŭ unufoje solvi kruĉenigmon de Stano Marĉek. Komencantoj pri Esperanto aŭ malspertuloj pri kruĉenigmoj povas ludi tiun ludon laŭ inversa metodo. Mi mem provis tion por tiuj kruĉenigmoj, kiuj ŝajnis al mi tro malfacilaj. En tiaj okazoj mi unue legis la solvojn, serĉis en la vortaro la sencon de nekonataj vortoj, serĉis en Vikipedio informojn pri nekonataj urboj, plantoj, bestoj ktp... kaj nur poste provis ludi, sen rigardi la solvon. Kiam mi havas tempon kaj emon ludi kruĉenigmojn, mi fotokopias la koncernan ludon, tiel ke mi povu provi ĝin denove post kelkaj tagoj, kaj ĝoji pri tio, ke mi jam kapablas solvi ĝin senhelpe. Tiamaniere oni povas riĉigi sian vortprovizon kaj ankaŭ siajn ĝeneralajn konojn. Kaj kia plezuro por la okuloj estas admiri la buntajn formojn de la kruĉenigmoj kaj iliajn belajn, nekutimajn strukturojn! Multaj kruĉenigmoj entenas diversajn surprizojn: Esperantajn proverbojn, ŝercojn, karikaturojn, fotojn, desegnaĵojn...

Unu el la tre valoraj surprizoj estas la amuza fable “Du hundoj” de Ignacy Krasicki, elpoligita de Paweł Janovczik:

“Kial vi dormas en ĉambro, dum mi ekstere frostas? – Diris al mops’ grasa hundo aĉa.

Kial? – Jen mi al vi respondas: vi al homoj servas,”. La spritan klarigon de la mopso vi trovos en la kruĉenigmo, kiam vi solvos ĝin (...mi al homoj plaĉas). Cetere, ĉu vi scias ion ajn pri la aŭtoro de tiu fable? Mi sciis nenion pri li antaŭ ol ekkoni tiun ĉi amuzan fablon, kies humuron mi povis aprezi nur solvante la kruĉenigmon. Pro scivolemo mi serĉis en la reto la nomon de la fablisto kaj eksciis interesajn informojn pri li kaj liaj verkoj. Se mi trovos ankaŭ aliajn fablojn de li verkitajn, mi tre ĝojus. Jen kiamaniere la kruĉenigmoj riĉigas la konojn de la ludantoj.

Mi elektis por vi ankaŭ specimemon de karikaturo:

Estas ege malĝentile primoki ies aspekton, ĉu ne? La spritan humoran respondon de la ofendita sinjorino vi trovos solvante la enigmon (“*Ŝajne tio estas vero, se tion rimarkis la azenoj*”).

Vi povas ĝui tiujn ludojn ĉu sole, dum via libera tempo, ĉu kune kun geamikoj, dum esperantistaj renkontiĝoj.





Landaj Rezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; info@esperanto.org.au. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; aon.913548977@aon.at. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; financoj@fel.esperanto.be. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; belabutiko@esperanto.org.br. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; eab@esperanto.org.uk. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; mrvp@interpre.org; ilei@espereto.com. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; polnickypavel@seznam.cz; cea.polnický@quick.cz. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; strigo@esperanto.cl. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; arko.gong@qq.com. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; arnecasper@yahoo.com. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; ahto.siimson@esperanto.ee. **Finnlando:** Sylvia Hämäläinen, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; sylvia.h@kolumbus.fi. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; esperanto-france@esperanto.org.net. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; wolfgang.schwanzer@esperanto.de. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; zsofia.korody@esperanto.de. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; simio_2004@yahoo.es. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; esperanto@isl.is. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; saviogp@netvision.net.il; esperantisto@live.com. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; silkovojo@aliceposta.it. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; esperanto@jei.or.jp. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; marija@hes-keu.hr. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; irenaa@takas.lt. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne; akbondhus@jkn.no. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; gddewar@ihug.co.nz. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; mtatara@gmail.com. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; asocio@esperanto.pt. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; sezonoj@mail.ru. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; zciric2@gmail.com. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; petro@ikso.net. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B Igh 1303, SE-931 38 Skellefteå; leif.holmlund@telia.com. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; ch_scheidegger@bluwin.ch. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; rezamenhof@yahoo.com. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; esp.togo@cafe.tg. **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; usa@esperanto-usa.org. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; uea@uea.org. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** ilei.officejo@gmail.com.



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festival Piosenki Esperanckiej

LA SESA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ

okazos

en **VROCLAVO** (pole Wrocław)

la **19-20an de majo 2018**

La festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo,
2. solisto.

Aĝo de la partoprenantoj: de 6 ĝis jaroj.

Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj.



PRIJUĜAS INTERNACIA ĴURIO

La 19an de majo – Konkursa provaŭdo de partoprenantoj

La 20an de majo – Koncerto de Premiitoj

Europejskie

Centrum

Edukacji

Międzykulturowej



HONORA PATRONECO
EUROKKA

JUNA AMIKO, revuo de ILEI
MILA VAN DER HORST KOLIŃSKA

Sendu vian aliĝilon ĝis la fino de la aprilo 2018 al la organizanto

LA EŬROPA CENTRO DE INTERKULTURA EDUKADO

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com skribante en la temo de la mesaĝo: E-kanto aŭ telefone +48 692 551 131, +48 512 456 449,

<http://novajhoj.weebly.com/e-kanto-festivalo.html>

<https://www.facebook.com/efekantoj/>

<https://www.facebook.com/Europejskie-Centrum-Edukacji-Międzykulturowej-250733122029789/>

www.ecem.com.pl

